

Verschiĝnt maandelijks  
Zeventiende jaargang  
Nummer 6 (192)  
JUNI 1950

Vertegenwoordiger in Nederland:  
**LEEN**  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P.M. Mabeesoone  
Pythagorasstr. 122 Amsterdam O.

Orgaan van de  
**VLAAMSE ESPERANTISTEN-BOND**  
POSTBUS 342, BRUSSEL  
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 75 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:  
België: 60 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

### Dokumenta Servo KIO OKAZIS EN 1949?

#### RADIO.

La nombro da Esperanto-disaŭdigoj plimultiĝis per la ĉiusemajna kvaronhora elsendo de la sveda stacio Stokholmo. La elsendoj de Budapesto ĉesigis, verŝajne pro manko de aŭskultantoj. Ankaŭ la monatan pri-esperantan elsendon de VARA (Hilversum, Nederlando) oni ĉesigis. Ĉiutage elsendis Parizo, Prago kaj Sofio. Ĉi lastan ni ne povis aŭdi. Apartan mencion meritas la raportoj pri kongresaj de la Franca Radio kaj la monataj interesaj artplenaj elsendoj de la Verda Stacio (Ĉeĥoslovakujo). Estas bedaŭrinde, ke la esperantistoj ne pli aŭskultas la esperantoprogramojn kaj ne sufiĉe skribas al la radio-stacioj. Tio tre endanĝerigas la pluekzistadon de la por la movado tre gravaj E-elsendoj.

#### POSTO.

En Aŭstrujo aperis esperanto-poŝtmarko, kiu per verda stelo, la vorto Esperanto kaj oliva branĉo bele figuras nian idealon. La ĉeĥoslovaka poŝto eldonis serion da ilustritaj poŝtmarkoj, inter kiuj troviĝas kvar kun E-teksto.

#### PRAKTIKA UZADO.

Grava fakto estas la en Viskadalen okazinta E-lingva kurso pri «Sociaj problemoj kaj institucioj en Svedio». Ĝin organizis la Lab. Esp. Asocio kaj la Laborista Kleriga Asocio. La usona Socialista Laborista Partio eldonis E-lingvan gazeteton «SLP-Folion» por diskonigi siajn ideojn alilande. La Nederlanda Sindikata Konfederacio (N.V.V.) aperigis ciklostilitan *Informan Bultenon* en E. En Ĉeĥoslovakujo oni publikigis presitan monatan bultenon pri politikaj kaj ekonomiaj faktoj koncerne tiun landon, sub la titolo «*Esperanto-Servo*». Krome oni informis la alilandan publikon pri la *Konstitucio* kaj pri *Lerneja Reformo* per E-lingvaj libretoj (jam menciitaj sub Literatura). Pri *Nuntempa Pollando* temas broŝuro eldonita de la Asocio de E-istoj en Pollando. La Social Credit Coordinating Centre en Anglujo propagandas siajn ideojn tutmonde per ampleksa broŝuro *Maŝinoj, mono kaj mondpaĉo*, de C. Marshall Hatterslev (Ne senpaga, sed mendebla ĉe Libro-Servoj!). Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke la Department of Public Information de la Unuiĝintaj Nacioj mendis 1000 ekzemplerojn de la en *Amerika Esperantisto* aperinta *Universala Deklaracio* de Homrajtoj. La Skandinavia Aer-Sistemo (S.A.S.) eldonis tre belan, ilustritan prospekton. La K.L.M. (Reĝa Aertrafika Kompanio) publikigis duan eldonon de sia *Historio de K. L.M.* La Londona Kooperativa Societo okaze de la antaŭ-kongreso en sia urbo aperigis esperantlingvan afiŝon kaj prospekton. Fremdultrafikaj eldonaĵoj aperis pri: Almelo kaj Groningen (ambaŭ en Nederlando), Bratislavo, Slovakaj Montaroj, Bulgarujo, Koge (Danujo), Karlovy Vary (Carlsbad-Ĉeĥoslovakujo) Parizo (Gvidlibro 62-paĝa, okaze de l' SAT-kongreso) kaj Tirolo.

G.P. De Bruyn

### LEEN - Kongreso 1950

En la verko de Dro E. Privat «Vivo de Zamenhof» ni povas legi priskribon de la kongreso en Bulonjo-sur-maro. Per ĉi tiu priskribo Privat kondukas nin en la kongresejon; ni vidas d-ron Zamenhof en la fronto de la salono kaj ni aŭdas liajn vortojn: «...tra la aero de nia salono flugas misteraj sonoj, sonoj tre mallaŭtaj, ne aŭdeblaj por la orelaj sed sentebaj por ĉiu animo sentema; ĝi estas la sonoj de io granda, kiu nun naskiĝas...». En «Vivo de Zamenhof» ni legas kiamaniere la kongresanoj montris sian entuziasmon, kiamaniere ili tie en Bulonjo-sur-maro spontane demonstraciis por la afero de Esperanto.

Pasis la Paskaj tagoj. Ni kongresis en Groningen. Ankaŭ tie kunvenis kelkaj centoj da Esperantistoj; sed kie estis la entuziasmo, en kiu momento tiu ekstazo estis rimarkebla, kiu katenis la kongreson en Bulonjo-sur-maro? Kial la sfero en ĉi tiu salono tiel ege diferencis de tiu en la unua kongreso? Kie ni povis konstati tiun spontan ateston, kiu ekestis en mil naŭcent kvina?

La esperantista mondo ŝajnas mortanta, estingiganta pro manko de aktiveco. Nur malmultaj sin jungas antaŭ la afero kaj ili laboregas por ĉiuj, sed la forto tamen estas for. La esperantistaro kvante kreskis, sed kvalite ĝi malprogresis. Aŭ ĉu eble nenio plu estas farennda, ĉu ĉiuj problemoj jam estas solvitaj?

Ni scias, kiel Zamenhof iam opiniis: «Miaj paperoj estas forbruligitaj, sed la ideo restas, mi komencas denove.»

Sed kiel reagas la Esperantistoj, kiam ili renkontas senluziigojn?

Dum diskuto kun delegitoj de A.N.S.E. mi aŭdis, ke prelegoj pri Esperanto ne estas taŭgaj por studentoj. Tiujn prelegojn ĉeestas nur kelkaj studentoj, kiuj la sekvontan tagon estas forgesintaj la tutan aferon. Sekve oni ne plu faru prelegojn pri Esperanto.

Ĉu nia reago estu: «Ni ne havas rezultatojn, do ni ĉesu»; aŭ ĉu ni devas daŭrigi, ĉiam denove fari prelegojn, rompi per rezonado la indiferentecon!

«La rezultatoj estas etaj; sed se la entuziasmo restas, ni daŭrigos.» Tiel Zamenhof parolis, tiel ĉiu Esperantisto devas paroli.

Anstataŭ paroli ni silentas, anstataŭ batali ni faras eĉ negativan laboron. Ni likvidis la konsilantaran sistemon, detruis bonan planon pro tio, ke personoj ne estas troveblaj por ĝi. La konsilantoj malaperis el la regularo por konformiĝi ĝin al la faktoj. Sed se ne estas troveblaj konsilantoj, tio estas eraro en la sintenado de la Esperantistoj, kaj tiu sinteno devas esti korektata, sed tio ne estas eraro en la regularo.

Nuntempe pli ol antaŭe estas necese, ke la Esperantistoj kritikis sin mem. Estas necese, ke ili komprenu kial ili estas Esperantistoj, kaj al ĉiuj kiuj estas Esperantistoj pro la oportunaĵoj, kiujn la lingvo donacas al ili, al ĉiuj, kiuj ne komprenas aŭ neas la grandan valoron de la interna ideo, la profunda senco de nia afero, mi volas konsili relegi la kongresparoladon numero 2: «...ĉiuj ŝatis Esperanton ne tial, ke ĝi alproksimigas reciproke la korpojn de la homoj, eĉ ne tial, ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj, sed nur tial, ke ĝi alproksimigas iliajn korojn.»

La interna ideo estas la ununura kerno. Kaj kiel ni povas propagandi, kiel labori, se la Esperantistoj mem ĉiam kaj ĉiam atribuas malpli da valoro al la interna ideo kaj iom post iom pli kaj pli interesiĝas pri la praktikaj avantaĝoj, jes precipe pri tiuj.

Ĉu ne estas malgajde, ke dum tiu interparolado de la A.N.S.E. delegitoj, oni deklaris, ke ni devas pli atentigi la studentojn pri la praktika flanko de la afero?

La Esperanto-movado malfortigas pro la kulpo de la Esperantistoj mem. Ĉiam pli oni malatentas la internan ideon, ĉiam pli da Esperantistoj ne scias aŭ ne komprenas ion pri ĉi tiu plej grava senco de Esperanto.

Propagando devas esti farata, sed plej multe la propagando devas esti farata internen; ĉiuj esperantistoj denove devas kompreni kion signifas Esperanto, kio estas la pli profunda senco de nia idealo; ili denove devas reiri al la konceptoj de Zamenhof: «...kun tiu Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenian komunan.»

Internen ni devas propagandi! Kaj se mi konsideras la situacion en la groningenena salono, malgajde min, ke la Esperantistoj al unu el la plej eminentaj fervoruloj de nia movado, al s-ro Baas, kuraĝis fari tiun promeson, kiun ili ankaŭ jam faris al Zamenhof ĉe la akcepto de Esperanto kaj kiun ili poste ne povis plenumi: «Forte labori por la movado!»

En Groningen mi senluziigis, sed tamen mi scias, mi estas konvinkita, ke la idealo denove povas ekvivi, ĉar vi ĉiuj estas Esperantistoj, ja, estis iam tempo en kiu ankaŭ vi kun entuziasmo volis batali por Esperanto, tempo en kiu ankaŭ vi bone konsciis la grandajn eblojn, kiujn Esperanto povas doni al la homaro, tempo en kiu vi bone komprenis la grandan valoron de la interna ideo.

Ke tiu tempo revenu!

Cor van der Roest (estrarano de Ekstazo).

### E-MONUMENTO REKONSTRUITA (Teksel).

En la jaro 1935a estis inaŭgurata en la vilaĝo Den Burg, insulo Teksel, monumento honore al la rememoro de Dro Zamenhof. Precipe Sro Jon. M. Duinker, sukcesis, en malpli ol unu jaro, akiri la monon, bezonatan por la konstruo. En 1941 la komandanto de germana S.S. bataliono detruigis ĝin.

En 1945a la 6an de Aprilo dum sanga batalo, «la Rusa-milito» (batalo inter ribelanta Georgia regimento kaj la germana armeo), S-ron Johan Duinker kaj naŭ aliajn loĝantojn de Teksel murdis germanaj militistoj. Samtage, la frato de Duinker, G. Duinker, tiel grave vundiĝis dum la bombardado de la vilaĝo Den Burg, ke li iom poste mortis. La fratinoj Duinker estis entuziasmaj propagandistoj de Esperanto kaj per la Tekselaj

gazeto, kun ili eldonis, ili ege propagandis la disvastigon de la internacia lingvo.

Estas kompreneble, ke Sro Johan Duinker kune kun aliaj planis la rekonstruon de la monumento. Ili ne vidis la tiom deziratan tagon.

Aliaj plu laboris, kaj jam en Februaro 1946 la mono, bezonata por la rekonstruo, estis kolektita ĉe Esperantistoj, amikoj kaj la Tekselo loĝantaro.

Sed nun ĝi efektiviĝis. La reinaŭguro okazis la 29an de Majo 1950, la duan Pentekostan tagon, posttagmeze je la tria horo.

La rekonstruo komitato invitis ĉiujn gesumideanojn kaj matene je la 12a horo okazis kunveno de la Nord-Holanda Esperanto klubo La Norda Stelo. Dum tiu kunveno oni prezentis la filmon pri la konstruo de la monumento en 1935a kaj pri la ekskursoj, kiujn la Norda Stelo faris al Teksel antaŭ la milito.

(La Rekonstrua Komitato).

### SOMERAJ KURSOJ 1950

Pli kaj pli proksimiĝas la 27-a de julio, la tago en kiu la bela konferencojejo «Oolgaardthuis» en Arnhem (Nederlando) malfermos siajn pordojn por gastame akcepti la multajn esperantistojn, kiuj deziras profiti la okazon pasigi malmultekostan kaj agrablajn ferion en Esperantujo kaj pro tio aliĝis al la someraj kursoj, organizataj de «La Estonto Estas Nia» kaj «Flandra Ligo Esperantista».

Arnhem, pro siaj belaj ĉirkaŭaĵoj, estas multvizitata urbo. Sed homoj, kiuj havas liberton, volas ne nur ĝui belan naturon, sed krome distri sin. Ĉiujare V.V.V. (la loka unuigo por fremdultrafiko) tiucele aranĝas logan programon kaj ĉi-jare la granda nacia ekspozicio «Mejloŝtono 1950», kiu okazos en la parkoj Sonsbeek kaj Zijpendaal kaj kiu donas bildon pri la progresado de Nederlando post la liberiĝo en 1945, certe estos grava logilo. Pri tiu vizitinda ekspozicio ĉiuj sekcioj jam ricevis detalan cirkuleron. Ne ploru, se vi ne havas tempon aŭ sufiĉe da mono por ĉeesti la internacian kongreson de Esperanto en la lumurbo Parizo, ĉar la arnhemanoj transformos sian urbon por vi en veran «lumurbon» en kiu oni eĉ konstruos Eiffelturon kun du galerioj! Famkonataj artistoj kreas la necesan «Parizan» sferon kaj ĉiamaniere vi povos amuziĝi! Do, se vi ne povos vojaĝi al Parizo, almenaŭ vizitu la Arnhemanojn «Parizon», aliĝante al la internaciaj someraj kursoj, gvidotaj de s-ino A.M.v.d. Wal-Brethouwer kaj s-roj Th. v. Gindertaelen, A. Weide kaj C. B. Zondervan. La kurskotizo (g. 36,—) inkluzivas la restadon dum la tuta kurso kaj ĉiujn manĝojn kaj ekskursojn! Vespere okazos diversaj prelegoj i.a. de d-ro W. Manders. Deklamos por vi s-ino E. Köhler-van Ghelder, kiu en Groningen rikollis grandan sukceson. Ĉu vi estas balbutanta komencanto? Ne grave! Perfektigu vian scion en la konversaciaj kursoj por ke vi ne restu eterna komencanto! Ĉu vi jam posedas diplomon A aŭ B? Tiukaze certe interesos vin la seminaĵaj kaj literaturaj lecionoj kaj la prelegoj.

Do, petu la detalan senpagan prospekton, enhavantan ĉiujn deziratajn informojn de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstraat 2, Deventer kaj aliĝu, pagante la duonon de la kurskotizo (g. 18,—) per postĝirkonto 70215 de Adm. Zomer-Cursus «L.E.E.N.», Sweelinckstraat 2, Deventer. La reston vi povos pagi tiuj post alveno en «Oolgaardthuis». Ne prokrastu, por ke vi ne ricevu la respondon, ke ĉiuj ĉambroj jam estas rezervitaj; ju pli baldaŭ, des pli bone. Vi ne bedaŭros! Ni garantias al vi agrablajn restadon en Arnhem!

### Universala Esperanto-Asocio.

Na de jongste aangepassing van de wisselkoers werden de verminderde bijdragen voor individueel lidmaatschap voor 1950 aldus vastgesteld:

MJ. (met jaarboek): 35 B.fr.  
MA. (met jaarboek en tijdschrift Esperanto): 90 B.fr.  
MS. (steunend lid met jaarboek en tijdschrift): 180 B.fr.  
Patrono:  
Het abonnement op Esperanto kost voortaan 60 B.fr.; een reclame in het jaarboek: 600 B.fr.  
Steunt de Internationale Esperanto-Vereniging door uw individuele aansluiting.  
Stort uw bijdrage op postchecknummer 416135, Fr. Couwenberg, Blankenberge.

# OBSERVOJ

# LA STUDANTO

# Wereldnieuws



**CIUJ VOJOJ KONDUKAS AL ESPERANTO**  
 Ankorau bone mi memoras la kompateman rideton de la Usona soldato kiun mi, en mi en plu scias kia okupacia oficejo en München, alparolis sinsekve en kvar lingvoj. Evidente, al tiu unulingvulo mi efikas barbare, pro tio ke mi ne parolis la anglan lingvon.

Prave malprave mi inklinas supozoj ke, krom laŭindaj esceptoj, la tuta anglosaksa mondo pli malpli same opinias. Evidente ili ne povas kompreni, ke la angla lingvo malmulte tentas la alilingvanojn, pro tio ke fonetike ĝi estas terure malklara. La fama franca lingvisto A. Meillet eĉ opiniis: « la plus confuse qui soit ».

La opinio, ke la angla lingvo tamen neniam fariĝos la ĝenerale akceptita lingvo internacia, ŝajne progresas inter la anglalingvanoj. Ja, depon la faskinta « Basic English » in sinjoro Wilshire elpensis lingvon por ĝenerala uzo kiun li baptis « Unolok », kaj nun iu angla pentroartisto ĵus elkovis « Picto »... Ni ĝoju, esperantistoj, ĉar Basic English, Unolok, Picto k.s. estas stupoj kiuj kondukas al Esperanto!

## Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer :

De schrijver Gibeau, die zich steeds in geldverlegenheid bevond, schreef eens een brief met de volgende inhoud aan de chef van een bekende champagnefabriek: « Mijnheer! Ik heb geen rooie duit en ik dweep met champagne. Stuur mij als 't U belieft een maad flessen van Uw goddelijke drank. Daarmee hoop ik mijn ellende te vergeten ». Nauwelijks had de chef die brief ontvangen of hij zond terstond het volgende antwoord: « Uw middel om Uw ellende te vergeten deugt in geen enkel opzicht. Het onophoudelijk en hardnekkig aanbieden van onze rekening zou U elk ogenblik weer herinneren aan Uw droev(ig)e toestand ».

Opgave : Tracht nu bovenstaande tekst in het Esperanto terug te vertalen en vergelijk de uitwerking vervolgens met de oorspronkelijke tekst in het vorige nummer.

1. Se (se mag niet worden weggelaten)

zulke lage cijfers.

6. Ik zag hem wandelen met zijn oudste zoon en vond, dat hij er gezond uitzag.
  7. De een en twintigste Maart begint de lente; de dag is dan even lang als de nacht.
  8. Denk goed na alvorens een zin te vertalen en verbeter de gevonden fouten.
- Zet de volgende zinnen in de tijdende vorm :
1. Hieraŭ la kamparano melkis tri bovinojn.
  2. Per ŝipoj oni transportas multajn varojn eksterlanden.
  3. En la ekzameno montriĝis, ke kelkaj kandidatoj ne bone lernis la lingvon.
  4. Se vi bone atentus, vi ne farus tiom da eraroj.
  5. Baldaŭ multaj esperantistoj vizitos la somerajn kursojn en Arnhero.

### FIDI — KONFIDI

Ofte oni intermiksas la verbojn « fidi » kaj « konfidi », kvankam tamen ilia signifo ne estas precize la sama. Ambaŭ

Brazilië. Dr. Milton Soares de Campos, hoofd van de Braziliaanse staat Minas Gerais, sprak de volgende woorden tot het 12e Braziliaanse Esperanto-congres: « Internationale verdragen noch compromissen vestigen de vrede tussen de volkeren. Vrede zal eerst dan heersen in de wereld, wanneer hij een gedachte en een besluit zal zijn, die wortelen in de harten van de mensen. Daarom is Esperanto één van de uitmuntendste bevoorwaars van de vrede ».

Duitsland. Aan de universiteit te Hamburg werd het Esperanto-onderwijs opgedragen aan dr. J. Weber.

Engeland. In het jaar 1949 werd aan 22 scholen Esperanto onderwezen aan ± 1550 leerlingen, grotendeels onder de normale schooltijden.

Griekenland. Op 9 Aug. 1949 heeft de Minister van Cultuur en Nationale Ontwikkeling opnieuw een rondschrĳven gericht aan rectoren van universiteiten en hogescholen, hoofdinspecteurs van lager en middelbaar onderwijs en aan de directeuren van kweekscholen en middelbare onderwijsinrichtingen, waarin hij hun verzoekt het Esperanto-onderwijs te bevorderen. Verder beveelt hij het lezen van « Helena Esperantisto » ten zeerste aan, « opdat de betrokkenen op de hoogte geraken van de wereldbeweging voor Esperanto en de onafgebroken verbreiding van het Esperanto in alle landen ».

Oostenrijk. In Graz is een lector aangewezen voor het Esperanto-ondericht aan de universiteit.

Tsjechoslowakije. Aan de gymnasia in Galanta en Kezmarok hebben leerlingen Esperanto-clubs gevormd.

Uruguay. De jaarvergadering van de Onderwijzers-Federatie in Montevideo nam in Januari 1950 de volgende resolutie aan: « De vijfde vergadering van de Federatie van Onderwijzers in Uruguay wekt alle onderwijzers in de Republiek op, de internationale taal Esperanto te gaan leren, een gemakkelijke en neutrale taal, die zonder leraar geleerd kan worden en de aandacht en steun van elke opvoeder verdient, niet alleen om zijn grote opvoedende waarde, die door alle vakkundigen wordt erkend, maar ook als onovertefbaar middel tot wederzijds begrip en vereniging van alle volken van de wereld. Deze vergadering beveelt alle afdelingen der Federatie aan, te onderzoeken op welke wijze het onderwijs van deze taal in de naaste toekomst het best in de onderwijsprogramma's kan worden opgenomen, opdat dit punt in de volgende vergadering behandeld kan worden ».

Lest best : De VERENIGDE NATIES maken gebruik van Esperanto.

« Amerika Esperantisto » vertaalde de Verklaring van de Rechten van de Mens in het Esperanto. De plaatsvervangende algemene secretaris B. Cohen, hoofd van de afd. Publieke Voorlichting, verzocht de redactie om 1.000 ex. van deze Esperanto-tekst. Het verzoek, dat ogenblikkelijk werd ingewilligd, eindigde met de woorden: « Dat zou het ons mogelijk maken, onze pogingen om de vertalingen over de hele wereld te verbreiden, met de Uwe te verenigen ». Trygve Lie, mevr. Roosevelt en Henri Laurier (vice-algemeen secretaris van de « V.N. ») gaven uitdrukking aan hun dankbaarheid voor deze Esperanto-vertaling.

### AL HELSINGÖR!

Kiel ĉiujare okazos feriaĵ kusoj en Helsingör (Danl.) de 17-7 ĝis 24-7. F.L.E. kaj LEEN intencis organizi aŭtobusan karavanon por krome viziti la belan Danlandon: Skamlingsbanken — Hamleta kastelo Kronborg-kastelo Frederiksborg (Hilleröd), Silkeborg kun la Himmelbjerget — Helsingör, Kolding kaj Fredericia, eĉ Halsinborg en Sveduje. Kursoj de F-inoj Noll kaj Christensen kaj S-roj Morariu kaj De Goeij. Prezo cirkaŭ 150 G. por Ned. — 2.250 fr. por F.L.E.anoj. Detala cirkulero havebla ĉe P. M. Mabesoone — Pythagorastraat, 122, Amsterdam-O (L.E.E.N.) kaj la karavancstro Th. Van Gindertaelen, Leopoldstraat, 99, Mechelen (VEB). Ĝis nun tamen la nombro da partoprenantoj ne ebligas la arangon en la diritaj kondiĉoj. Do nepre anoncu vin antaŭ la 10a de Junio. Kiuj sin anoncis estos avertataj plej laste je tiu dato ĉu la karavano okazos aŭ ne.

### LIBRO - AMANTOJ!

- Ni petas vian atenton por la sekvantaj, antaŭnelonge aperintaj libroj:
- Invito al Ĉielo.* Originala romano de D. Sayers en plaĉa vesto. Ĝi vere forrabas la spiron de la leganto. gld. 6,40 bfr. 85
- Brulanta Sekreto* kaj aliaj rakontoj de Stefan Zweig. Libro memoriginda. gld. 2,25 bfr. 30
- A.B.C.-libro* por junaj infanoj, kun bildoj, versajoj, sur dika kartona papero kaj presita kolore. gld. 0,75 bfr. 10
- Interlingvistiko kaj Esperantologio* de Dr. Manders la aŭtoro de la monumenta « Vijf Kunsttalen ». gld. 2,25 bfr. 30
- Porti voor koper. Bestellingen aan :*  
 Vlaams E.-Instituut, Diepestr. 44, Antwerpen (giro : 3268.51 ; tel. : 244.30)  
 Boekendienst LEEN, Z.O.-Singel 5, Bergen op Zoom (giro : 76915)

**ENGELS ZONDER MOEITE.**  
 « My taylor is rich... My taylor is not rich... » Het hoofd diep gebogen over het bekende boekje leert Sammetje « Engels zonder moeite ». Bij de hand staat de fonograaf, die drie-, zes-, tienmaal hetzelfde zal herhalen. Wonder van de moderne techniek: Engels, Duits, Frans, Italiaans, al wat je maar wil « zonder moeite »!

Sammetje gaat talen leren, ook Spaans en Russisch. 't Komt te pas. Handelingen en plaatjes zal hij zich aanschaffen. Sjonge, sjonge, hij wordt nog een hele Piet! Maar niet vooruitlopen. Een voor een krijgt hij de talen wel onder de knie. Eerst Engels: « My taylor is rich... My taylor is not rich... »

**SPELLING EN UITSPRAAK.**  
 « It is beautiful... » Wat gek, hoe de uitspraak afwijkt van de schrijfwijze. Waarom schrijft men niet zoals men spreekt? Oompje, wat denkt jij ervan? — In al de talen — en het zijn er heel wat — die je gaat leren, Sam, stemt de uitspraak niet overeen met de schrijfwijze. Ook in het Nederlands is het zo, alleen merken we het niet. Na een paar jaartjes studie en een verblijf in Engeland krijg je de juiste uitspraak wel te pakken, jongen.

**EEN HEEL MENSENLEVEN.**  
 En nu verder. Duivels nog toe: nog ingewikkelder! Waarom wordt deze e uitgesproken als i, en deze a als e, en verder weer niet? Twee jaar studie voor de uitspraak van het Engels? Maar ik heb haast. Ik wil nog andere talen leren. Vergt het werkelijk twee jaar studie, Oompje?

— Ja jongen, en soms een heel mensenleven. Maar de moed niet opgeven! Eens één vreemde taal onder de knie, gaat het wel makkelijker voor de volgende.

Een mensenleven voor de studie van het Engels, wat minder voor de studie van het Spaans, nog wat minder voor de studie van het Russisch. Ik zal me moeten haasten, Oompje.

**DE OPLOSSING.**  
 — Ja Sam, en zo zal je ervaren dat een internationale hulptaal geen gek idee is. Denk er om, dat we in ons leven nog wat anders te doen hebben dan talen leren. Het Esperanto... — Je stokpaardje! Maar alles goed bekeken vind ik het nu niet meer zo dwaas. Alleenlijk, waarom is het nog niet algemeen aanvaard? — Alle zege veronderstelt strijd, Sam, vergeet dat niet. En wat betekent de duur van een paar generaties voor onze planeet die reeds miljarden jaren om haar as wentelt? Ook ik heb eens over grammatica's gebogen gezeten, in mijn tijd werden we niet in de waan gebracht dat het zonder moeite gaan zou. Denkkelijk zullen nog generaties over grammatica's met of zonder moeite gebogen zitten alvorens iedereen van de wenselijkheid van een gemeenschappelijke internationale taal zal overtuigd zijn. De mensen houden aan tradities: denk maar aan de engelse munten, maten en gewichten! Waarom het gemakkelijk maken als het moeilijk kan? Maar ik geloof in de vooruitgang en daarom zeg ik je: jongen leer talen als je er de moed en de tijd voor hebt, maar leer ook Esperanto en doe er nu reeds je voordeel mee, want als Esperantist sta je niet meer alleen. Met honderdduizenden in alle werelddelen kun je door Esperanto in betrekking komen. Verhoog de rijen van deze voorlopers die de doofstomheid en meteen het onbegrip te keer gaan die de mensen scheiden.

mi nur scius (voorw. wijs), ĉu li estas fidinda! 2. Je kioma horo vi komencos vian laboron? 3. Oni estas petata, neniel malpurigi la atendejon. 4. Ĉu ni mangos kuiritajn terpomojn? Mi preferas ilin frititaj (bep. van gesteldheid). 5. Malofte li eraras (niet: eraras sin!) sed ĉi tiun fojon (ĉi foje) li tamen faris malĝustan kalkulon. 6. Ŝajnas al mi dezirinde, ke ni nun iru hejmen (rich-tings-n!) kaj poste daŭrigu la interparolon. 7. Mia najbaro volis dronigi sian hundon, ĉar ĝi estis malsana. Li ĵetis ĝin en la akvon sed naĝante la kompatinda besto atingis la alian (transan) bordon. 8. Ju pli diligente vi studis, des pli granda estas la ŝanco, ke vi sukcesos. 9. Kiom da kapoj, tiom da opinioj estas konata proverbo. 10. Li estas pli sperta ol lia (niet sia, want antaŭulo is zelf onderwerp!) antaŭulo. 11. Kiel ajn rapide Petro kuris, Johano montriĝis la pli (niet plej!) rapida (montriĝi is een koppelwerkwoord) el la du (el ambaŭ). 12. Ĉiuj homoj ĝojis, kiam fine de februaro la frosto ĉesis kaj la vetero fariĝis iom malpli malmilda.

1. Por ŝagulo sufiĉas aludo. 2. Bonvolu respondi revenpoŝte. 3. La policano (policisto) portis civilajn vestojn. 4. Malprave oni kulpigis lin pri ŝtelo. 5. Kiom mi scias, li ne elbabilis la sekreton. 6. La horloĝo antaŭas dek minutojn. 7. La malsanulo iom post iom reakiris siajn fortojn. 8. Li celas mistifiki vin! 9. Levu la manojn! 10. Plenforte li kriis por helpon. 11. Komenco bona, laboro duona. 12. Li estas famkonata viro. 13. Konsidere la aĝon li estas inteligenta. 14. Ne plu sciante kion fari, li petis mian helpon. 15. Nu, mi vere miras pri tio! 16. Tio estas decidita afero. 17. Li kaptis la okazon por malaperi nevidate. 18. Fali de sitelo en barelon. 19. Senbatale la malamiko kapitulacis. 20. Jen vi havas! Tio decidigis la aferon.

Dentisto, kiu neniel sukcesis akiri la pagon por nova dentaro, kiun li liveris al iu sinjorino, fine skribis al ŝi jenan letereton: Estimata sinjorino, se mi ne posedos (estos ricevinta) post malpli ol du tagoj la de vi ŝuldatan sumon, mi estos devigata meti en kelkaj grandaj (gravaj) jurnalaj jenan anoncon: « Aĉetbla belega nova dentaro, nur tre mallonge uzata. Oni povas rigardi ĝin (ĝi estas rigardebla) ĉiutage ĉe sinjorino Smit, ĉefstrato 55, ĉi urbe. » La mono venis (estis pagata) la saman tagon.

### Vertaal :

1. Hij zei, dat hij om negen uur hier zou zijn, maar om tien uur was hij er nog niet.
2. Studeer zoveel mogelijk, opdat u met succes aan het examen zult kunnen deelnemen.
3. Het is beslist noodzakelijk, dat men aan het vraagstuk van een internationale taal meer aandacht schenkt.
4. Zonder hem ontmoet te hebben moesten we naar huis terugkeren.
5. Hij beweert, dat hij zijn best doet, maar als dat waar was, haalde hij niet

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. «LA ESTONTO ESTAS NIA»**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst :  
 Mr. A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, Tel. 96160.  
 Penningm. : P. M. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postr. 34563.  
 Boekendienst : H. A. Appel, Z.O.singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915.  
 Bibliotheek : E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst : H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Schr. cursus v. gevorderden, examen B: H.A.Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Alg.Ned.Esp.Examen-comm.: Mej.H.M.Mulder, Zilvermeuwstr. 29, Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A. : P. Moen, Schaarbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

**RAPORTO  
 PRI LA JARKUNVENO**

(fino)

9a. S-ro L. J. Burger defendas la proponon de sekcio Hago. La ĉefestraro tamen estas kontraŭ el propaganda vidpunkto; krome la antaŭajn jaron la plimulto preferis la nunan formaton. S-ro W. Böttcher subtenas la proponon de Hago, kiu tamen estas malakceptata (por 9; kontraŭ 27).

9b. Oni antaŭvidis sufiĉe longajn debatojn pri la propono de sekcio Haarlem, sed la neatendita sciigo de s-ro E. de Wolf, ke Haarlem pro la nunaj cirkonstancoj reprenas la proponon, rezultigas konsiderindan tempoŝparon.

10a. La ĉefestrara propono estas akceptata.

10b. Laŭ s-ro F. H. Kat la junularo preferu gvidi sin mem kaj havu ian memstarecon, sed tio kostas monon kaj pro tio li pledas por kotizo ankoraŭ malpli alta ol la de la ĉefestraro proponita, ĉar alioAZE eble neniam restos en la sekcia kaso. S-ro P. Mabeoone rimarkigas, ke la proponita kotizo eĉ ne kovras la kostojn de la gazeto. Se la junularo havas idealojn, ĝi oferu almenaŭ iom el propra poŝo por ties efektivigo. Ankaŭ laŭ la opinio de s-ro P. W. Baas la proponita kotizo jam estas sufiĉe malalta. S-ro Holleman atentigas pri la fakto, ke la proponita aranĝo validos ne nur por «Ekstazo» sed havos ĝeneralan validecon; se eble la sekcio helpu, por ke la junularo tamen povu pagi la proponitan kotizon. La propono estas akceptata; nur sekcio Hago per du voĉoj subtenas la deziron de Leeuwarden.

10c. La ĉefestrara propono estas akceptata. S-ro Baas denove atentigas pri la propaganda valoro de «De Esperantist» kaj laŭdas la aktivecon de Boskoop, kies ses anoj sukcesis varbi multajn donacantojn, kaj la imitindan ekzemplon de Amsterdam kaj Den Helder, kiuj regule sendas «De Esperantist» al diversaj aŭtoritatuloj, lernejoj, k.t.p.

11. Post kiam s-ro Mabeoone donis al s-ro Böttcher kelkajn informojn pri la kostoj de la gazeto, la budĝeto estas aprobata ĉi, kia ĝi aperis en la marta numero de N.E.

12. La ĉefestrara propono estas akceptata; krome oni laŭ propono de la ĉefestraro decidis trastreki par. 8 de la regularo, escepte de la unuaj tri linioj.

13. Sekcio Leeuwarden esprimas sian bedaŭron pri la propono de la ĉefestraro. Oni povus konservi la paragrafon, aldonante la vortojn «zo mogeljk». S-roj Holleman (Groningen) kaj Wolters (Amelo) subtenas la opinion de Leeuwarden. Post iom da diskutado, la ĉefestrara propono estas akceptata.

14. Laŭ la ĉefestraro la amendo de sekcio Groningen estas superflua; sendube ĝi jam estis entenata en la propono de Hago. Post kelkaj klarigoj pri la koncerna propono, ĝi estas akceptata.

15. La jarkunveno decidis ne pritrakti la proponon de sekcio Hoogezand, ĉar ĉi tiu propono ne permesas ĝian pritrakton.

16. S-ro H. Arends preferus ŝangi par. 47 jene: «...bestaat uit ten minste 5 en ten hoogste 9 leden». Post konsilo de la prezidanto, akcepti almenaŭ por la nuna jaro la proponon de la ĉefestraro, la koncerna propono estas akceptata.

17. Akceptis kandidatigon por la prezidanta funkcio nur s-ro H. J. Blokkel el Heemstede, kiu do laŭregulare estas elektita. Kiel ĉefestrarojn oni kandidatas f-inon S. Visser kaj s-rojn H. Behr, W. Böttcher kaj L. J. Burger. F-ino S. Visser kaj s-ro W. Böttcher, kiuj akiras resp. 32 kaj 30 voĉojn estas elektataj; s-roj Behr kaj Burger akiras resp. 3 kaj 9 voĉojn.

18. Kiel asociaj kaskontrolontoj estas elektataj s-roj P. v. Geel kaj H. A. Kroonder.

19. La kunveno decidis, ke la kontrolontoj de la biblioteko kaj ĝia kaso estu nomataj de sekcio Utrecht.

20. S-ro W. Böttcher proponas okazigi la venontjaran jarkunvenon je Pentekosto. Laŭ konsilo de la ĉefestraro oni decidis aranĝi ĝin kiel kutime je Pasko. Pri la loko, kie ĝi okazos, oni ankoraŭ ne decidis.

21. S-ro Baas dankas f-ino H. M. Mulder kaj la aliajn eksigintajn ĉefestrarojn pro ilia laboro. Laŭ propono de s-ro Holleman ĉi estas nomata honora prezidanto de L.E.E.N. kaj laŭ propono de s-ro Wolters, s-ro Holleman mem farigas honora membro. La ĝen. sekretario respondas al informpetoj de s-ro Böttcher pri event. Merkurioj-ekzamenoj kaj invito de s-ro Lapenna. S-ro R. J. Kuiper instigas la anojn ĉiel klopodi por pligrandigi la membronombro de L.E.

**ESPERANTO-ONDERWIJS  
 IN NEDERLAND**

**FL. L. E.**

Varbo-konkurso.

Ĉi-jare ni simple konstata ke ĝi ne estis sukceso. Tio instigis la estraron jam nun antaŭvidi novajn eblojn kaj novajn allogojn por la venontjara konkurso. Entute 24 novajn membrojn kaj 90 amikojn varbis la konkurantoj. Ni ne jam posedas (t.e. skribante tiun tekston) la detalan liston po varbanto, sed jes po sekcio. Jen la rezultato:

1. Mechelen varbis 7 membrojn kaj 30 amikojn  
 2. Brugge varbis 5 membrojn kaj 30 amikojn  
 3. Gent varbis 4 membrojn kaj 30 amikojn.  
 4. Roeselare varbis 10 membrojn  
 5. Brussel, varbis 1 membron.

Denove Mechelen gajnis la sekcian premion. Por la dua fojo ĝi estas ĉampiono: ni gratulas kaj deziras ke ĝi venontjare same forkaptos la gloron. Ĉiuj bonaj aferoj okazas minimume tri fojojn, ĉu ne!

Ĉiujn aliajn detalojn vi certe andos dum la jarkunveno de la kongreso.

Kvankam la konkurso finiĝis la 30-an de Aprilo, tio ne signifas ke la varbado devas stagni. Ni kontrolis la ĉi-jarajn membro-ciferojn kaj rimarkis ke nur 14 membroj subtenas nin finance, pagante 150 fr. por la nunjaro kotizo; en 1949 ili estis 18-oje. Ni certas ke ni ree atingos tiun nombron, kaj petas al tiuj, kiuj vere sentas sin ligan(in)o, kaj kiuj nepre volas la floradon de nia flandra esperanto-movado, tuĵ aldoni 75 fr. al la jam pagita ordinara kotizo.

Ni sendis al ĉiuj sekcioj liston kun revarbotaj membroj. Ni esperas ke multaj ree aliĝos, dank' al la persona influo de iu el la sekcio. Preparolu tiun liston en viaj laborkunvenoj.

Nia revuo.  
 Ni nepre ŝatas plibonigi kaj pligrandigi ĝin. Tial, dum estrar-kunveno en Gent ni decidis ke kiel eble plej ofte ni aperigos 6-paĝan gazeton. La du aldonaĵoj estas nur por flandroj, do ne enhavas tekstojn de L.E.E.N.

En la nuna jaro (sekvos ankoraŭ 5 numeroj), ni aplikos tion ankoraŭ dufoje, versajne en la septembra kaj la decembra numeroj.

Via sekretario.

wordt dit leerjaar, voor zover ons bekend, gegeven aan 33 verschillende scholen aan totaal 968 leerlingen. Vergeleken met het vorige jaar is het aantal scholen met 2, het aantal leerlingen met 102 toegenomen. Van de scholen behoren 6 tot het Katholieke, 4 tot het Protestantse, één tot het neutrale en 22 tot het Openbare onderwijs.

Met slechts enkele uitzonderingen wordt het onderwijs gegeven in cursussen na de gewone schooluren. Aan slechts één U.L.O.-school, 2 V.G.L.O.-scholen, één L.O.-school en een Technische Middebare school is dit onderwijs verplicht. Zoals bekend wordt Esperanto onderwezen aan 5 kweekscholen, w.o. één Katholieke. Verder aan één M.T.S., één blindeninstituut en 2 lycea (aan één daarvan als keuze-vak).

Aan totaal 16 L.O.-scholen, 3 V.G.L.O.-scholen en 4 U.L.O.-scholen wordt Esperanto-les gegeven.

De leeftijd der leerlingen varieert van 10 tot 25 jaar. Twee Katholieke scholen leiden op voor het diploma A.

We laten de namen van de plaatsen, waarontrent we bericht ontvingen, volgen. Mocht een onzer lezers blijken, dat er een ontbreekt, dan ontvangen we daarvan gaarne bericht. Alzo: Alkmaar, Amersfoort, Almelo, Amsterdam 5, Arnhem, Bergen-op-Zoom, Bilthoven, Deventer 2, Edam, Enschede, Gouda, Groet, Groningen, Grave, Grijpskerk, Den Haag, Haarlem 2, Hengelo, Hilversum, Huizen, Lekkerkerk, Leeuwarden, Ruischerbrug, Rotterdam, Schoorl, Utrecht, Venlo, Volendam, Winschoten en Winterswijk.

P. W. Baas  
 Dir. Bureau « Esperanto bij het onderwijs ».

**VERDLANDO VOKAS**

Listo de radio-dissendo en aŭ pri Esperanto kaj informoj. Tempindiko laŭ la nederlanda (= mezeŭropa) horstemo. Flandroj kaj aliaj Greenwich-tempoj bonvolu depreni unu horon.

Mallongigoj : I = informoj, P = parolad(et)o, K = kurso.

<i>Ciutage</i>	15.45-16.00 Prago, 25,51 m. kaj 1935 m. : I. 19.45-20.00 Sofio, 39,11 m. : I. kaj P. 22.00-22.15 Prago, 31,41 m. : P.
<i>Dimanĉe</i>	9.00, 11.00, 13.00 « Nigra Stacio », 47,13 m. : Gram.
<i>Lunde</i>	6.30- 6.35 Vieno, 513 m., 25 m., 31 m., 41 m., 48 m. : I. 8.15- 8.30 Stokholmo, 27,83 m., 49,46 m. : I. 16.15-16.30 Stokholmo, 19,80 m., 27,83 m. : I. de red. Karl Soderberg. 17.30-18.00 Rio de Janeiro, 375 m., 30,71 m. : K. 22.45-23.00 Prago, 470 m., 315 m. : I. kaj P. 23.30-23.35 Budapeŝto I, 556,5 m. : I.
<i>Marde</i>	2.15- 2.30 Stokholmo, 27,83 m., 49,46 m. : I. 12.55-13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro A. Baur. 15.15-15.30 Munĥeno, 48,70 m., 405 m., Nurnbergo, 316 m. : K. (Nur ĉiuduarde). 18.40-18.45 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
<i>Merkrede</i>	0.45- 1.00 Gvatemalo, 49 m. : I. 6.45- 7.00 Munĥeno, 48,70 m., 405 m., Nurnbergo, 316 m. : Ripeto de la marda elsendo. 20.15-20.30 Varŝavo III, 48,23 m. : I. 22.45-23.00 Prago, 470 m. : I. kaj P. 23.00-23.45 Prago 470 m., 315 m. : « La Verda Stacio » dissendas sian tre aŭskultindan artoprogramon! (Nur la unuan merkredon de ĉiu monato!)
<i>Ĵaŭde</i>	12.55-13.00 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : P. de d-ro Edmond Privat pri mondfederacio kaj paco. 15.30-15.45 Graz (Alplando), 240 m. : K. de prof. Haischegg. (Nur la unuan ĵaŭdon ĉiumonate). 18.40-18.45 Berno, 31,46 m., 48,66 m. : Ripeto de la tagmeza elsendo.
<i>Vendrede</i>	9.05- 9.20 Parizo, 347 m. : K. (Nur ĉiudavendrede). 16.40-16.55 Vieno, 25 m., 31 m., 41 m., 48 m., 203 m. : I. (Nur ĉiudavendrede). 18.15-18.30 Hilversumo I, N.C.R.V., 402 m. : P. (Nur unufoje en 5 aŭ 8 semajnoj). 30-VI. '50 : A. de Smit pri : « Ĉu espero aŭ timo ? » 19.50-20.00 Sofio, 39,11 m. : I. 23.30-23.35 Budapeŝto, 556,5 m. : I.

Informoj kaj petoj :

Parizo ankoraŭ silentas en Esperanto ! ! — Ĉu vi jam sendis petskribon al Franca Radio, Esperanto-fako, Parizo, pri reokazigo de la Esperanto-elsendo ? Se ne, b.v. skribi ! Se jes, bonvolu reskribi !

Ankaŭ nederlandaj radio-stacioj apenaŭ dissendas Esperanton.

A.V.R.O. havas sendotempon nur por novjarsaluto en Esperanto ; K.R.O., esdinte Esperanto-prelegon ĉiudummanĉespere... antaŭ la milito, neniam plu dissendas radioprogramon en Esp. ; N.C.R.V. unufoje en du monatoj elsendas Esperanto-prelegon V.A.R.A., antaŭ la milito elsendinte Esperanto-radio-kursojn kaj prelegojn kaj post la milito ĉiuduasemajne paroladeton, tute silentas en Esperanto lastatempe ; V.P.R.O. nur kelkokaze aŭdigas Esperanton.

La ĉefa afero estas, ke la estraroj de la radio-asocioj sciu, ke multaj membroj deziras pli da elsendoj en kaj pri Esperanto. Ĉiu radio-asocio-ano favora al Esperanto nepre sendu tiurilatitan peton al la estraro de sia asocio.

Agrablan aŭskultadon deziras al vi ĉiuj S. S. de JONG Dzn, Radio-Servo N. C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando, al kiu oni sendu ĉiujn informojn pri radio-elsendoj.

**ANTAŬKONGRESO EN  
 ANGERS**

Kongresanoj 1950 ! Se vi volas ĝui ravan semajnon en unu el la plej belaj regionoj de Francujo, ĉestu la antaŭkongreson de ANGERS (28 a de julio — 4-a de aŭgusto) ?

ANGERS kuŝas en la valo de la rivero Loire (« La ĝardeno de Francujo »), je 300 km de Parizo.

Per aŭtobusoj kaj ŝipo, ekskursoj (elektotaj) estos organizataj al pluraj belegaj kasteloj kaj vidiindaĵoj kaj al la atlantika maro banloko de La Baule).

Vi vizitos la vinberojn kaj gustumos la famajn vinojn de la regiono (« vins d'Anjo »).

En la urbo mem — (100.000 loĝantoj) vi vidos mezepokan kastelon kaj rimarkindajn muzeojn interalie tiun de la mondkonataj arttapiŝoj.

Diversaj prezoj estas antaŭvidataj por la restado.

Alĝiprezco : 300 f. po persono kaj 150 f. po alia membro de familio aŭ gejunuloj malpli aĝaj ol 20 jaroj.

Petu informojn al F-Ino Nouais, 28, Boulevard Descazeaux ANGERS (Maine-et-Loire).

**UNIVERSALA KONGRESO  
 5-12 AUG. EN PARIZO**

Adreso : 35-a Universala Kongreso de Esperanto, 62 avenue de Clichy, Paris 18, France.

Informojn pri nederlandaj karavanoj aŭtobusa kaj vagonara donas s-ro H. Bakker, van Tuyl van Serooskerkenplein 33, I Amsterdam-Z; informojn pri la flandra aŭtobuskaravano s-ro F. Rooze, Sabbestraat 36, Brugge.

Por ke la kongresa laboro estu efika, la komitato de U.E.A. decidis dividi la farotan laboron inter kvar sekcioj, rilatantaj al la jenaj punktoj :

I. Esperanto en lernejoj : unuagrada, duagrada, superaj.

II. Internacia trafiko : komerco, industrio, fervojoj, poŝto, polico, foiroj, permaraj kaj peraeraj rilatoj, turismo, banko, borso, dogano.

III. Teoriaj kaj aplikataj sciencoj : kemio, matematiko, fiziko, medicino, farmacio, arkitekturo.

IV. Intelektaj interŝanĝoj : radiofonio, stenografio, dokumentado, plastikaj artoj, humanismo, beletristiko, filozofio, teatro, kino, skoltismo, vegetarismo.

Ĉiu kongresano indiku pri kiu el la kvar sekcioj li interesiĝas kaj povos partopreni en la diskutado. Ĉiu landa asocio serĉu inter la kongresanoj tiujn, kiuj konsentos prepari raporton pri unu el la temoj de iu sekcio kaj komisiis la plej kompetentajn el ili, gvidi dum la kongreso la nacian delegacion. Okazos du kunvenoj por la sekciaj laboroj en kiuj la reprezentantoj de la landaj asocioj legos kaj klarigos siajn raportojn. Poste sekvos diskutado, kaj fine la sekcio formulos la rezulton de sia diskutado en apartaj decidoj kaj rezolucioj.

Karaj Legantoj,

Ĉar jare aperas nur dek unu nroj de nia organo, kaj por la liberto, la venonta nro (por julio kaj aŭgusto) atingos vin la 15/7. La posta nro, la Septembra do, estos en via posedo komence de la dirita monato. Do ne atentu N.E. aŭ F.E. komence sed meze de julio.

La Redakcio.

